



# **starto**

**ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**1980 · 3 · (79)**



PNEŬMATIKA ŜOSERULILO, TIPO GRW 101

Servoregado, fleksebla aligo de la antaŭaj duopoj de la pneŭmatikoj, optimuma kovro de la antaŭaj kaj malantaŭaj radoj, distribuo de la premo 1 : 1, hidraŭlika sistemo de la altoregulado, aŭtomata plenigilo de la pneŭmatikoj, kontinua veturo per la ŝanĝilo de la torda momanto.

Por la movo de la rulilo estas uzata perakve malvarmigata dizelo ZETOR, tipo Z 8001, kun la povumo 55 kW ĉe 2200 revoluoj minute.

La ŝoserulilo havas du bremsojn. La pneŭmatika-hidraulika makzela pieda bremsa efikas je la duopoj de la pneŭmatikoj. La zona mana bremsa efikas je la rapidumo.

La ŝoserulilo atingas la laboran rapidecon 0 - 9 km/h kaj la transportan rapidecon 0 - 20 km/h.

La maso, sen aldonajoj, de la rulilo estas 7850 kg, la maksimuma 18700 kg. Radiuso de la interna turno estas 5,90 m, kaj de la ekstera 7,80 m. La brulaĵujo havas volumenon 200 l kaj la akvujo 1100 l.

Produktas la entrepreno "Stavostroj" surbaze de la licenco interkonsento kun la okcidentgermana firmao "Hamm". La senescepta eksportanto estas "Strojexport" Praha, Ĉeĥoslovakujo.

## HEREDAĴO DE LA LABORISTA KORPEDUKADO

Fine de junio ĉi-jare denove en nia lando estos la SPARTAKIADO. Ĉar tiu ĉi okazintaĵo estas interesa ne nur por sportuloj kaj gimnastikuloj, sed ankaŭ nia movado havas ion komunan kun la historio de tiuj ĉi korpedukaj manifestacioj, ni preparis jenan informon:

La unua korpeduka manifestacio laborista sur la teritorio de la nuna Ĉeĥoslovakio estis okazonta jam en la jaro 1915. En ties preparoj, ĉesigitaj pro la eksplodo de la unua mondmilito aktivis ankaŭ Jiří František Chaloupecký - /1890 - 1922/ -, elstara aganto de la ĉeĥa laborista movado.

Li naskiĝis en fervojista familio kaj malgraŭ malfacilegaj materiaj kondiĉoj sukcesis finstudi gimnazion, dume laborante kiel fervoja oficisto. Baldaŭ li fariĝis proparolanto de la junularo en "Korpekzerca movado", asocia gazeto de Laboristaj korpekzercaj unuiĝoj /LKU/. En la Manifesto de LKU, verkita en 1910, li proklamadis la sloganon: "Ĉiu laboristo ekzercanto, ĉiu ekzercanto konscia laboristo".

Post la estiĝo de Ĉeĥoslovaka Respubliko en 1918 Chaloupecký plene dediĉis sian energion al la agado en la laborista korpeduka movado, samtempe senlace partoprenante en fervojistaj sindikatoj. Per siaj artikoloj en la jam menciita gazeto li akcentis signifon de revolucia teniĝo de la laboristaro. Dum la ĝenerala striko, decembre 1920, li okupis gvidan pozicion inter la maldekstre orientitaj marksistoj en la Asocio de LKU, kontraŭante la politikon de la dekstraj gvidantoj de la socialdemokratia partio.

Sub la gvido de J. F. Chaloupecký estis starigita ankoraŭ fine de la sama jaro Federacio de laboristaj korpekzercaj unuiĝoj /FLKU/, kies fonda kongreso okazis la 8an de majo 1921 en Prago. La kongreso rezoluciis okazigi en la ĉeĥoslovaka ĉefurbo la unuan laboristan Spartakiadon.

La Spartakiado sukcesis ĉefe dank' al neordinaraj organizaj kapabloj de Chaloupecký, kiu entuziasmigis federacianojn al preparo de la ekzercejo sur la areo de Maniny.

Dum la ĉefa spartakiada tago, la 26an de junio 1921, prezentigis antaŭ pli ol cent mil spektantoj dek mil ekzercantaj gejunuloj kaj dekkvar mil viroj kaj virinoj. La ferma sceno "Venko kaj revolucio" simbole interpretis la politikan programon de la ĉeĥoslovaka laboristaro.

La Spartakiado de 1921 estis politika kaj organiza ĉefverko de J. F. Chaloupecký, al kiu la aŭtoro donis ankaŭ simblan nomon. Tiun ĉi nomon poste aplikis por siaj festoj spor-

tuloj de Sovetio kaj post la dua mondmilito ankaŭ tiuj de aliaj socialismaj landoj.

La nomo de Chaloupecký estas firme ligita ankaŭ kun la Esperanta movado enlanda, kun la klopodoj pri la disvastigo kaj apliko de la Internacia lingvo. Li estas fondinto de Laborista Unuiĝo Esperantista /1911/, fako de la socialdemokratia kleriga asocio "Laborista Akademio". Inter la jaroj 1912 kaj 1914 li eldonadis en Esperanto gazeton La KULTURO, kiu mobilizis laboristojn konsciajn pri sia klasa aparteno.

Okaze de la kultura ekspozicio de FLKU en Prago /1923/ la fondinto de KPC B. Šmeral diris, ke Chaloupecký estis unu el la plej elstaraj kulturagantoj de la partio, viro kun aŭdacaj pensoj kaj noblaj celoj.

/r/

## KONSULTIĜO EN SOFIO

Jam la 13-an fojon kunvenis reprezentantoj de ok Esperanto-asocioj de socialismaj ŝtatoj. En tiuj organizaĵoj nun grupiĝas proksimume 40 000 membroj.

Kiel vi povas mem legi, la konsultiĝo pritraktis gravajn aktualizaĵojn, kiuj influas E - movadon. La foto montras parton de la partoprenantoj.



## KOMUNIKAĴO PRI LA 13a KONSULTIĜO

De la 18-a ĝis 23-a de aprilo 1980, en Sofio, Bulgario, okazis la 13-a konsultiĝo de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. Konsultiĝon, kiu pasis sub la signo de la 110-a datreveno de la naskiĝtago de V.I. Lenin, partoprenis reprezentantoj de jenaj organizaĵoj: Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko, Asocio de Sovetaj Esperantistoj, Bulgara Esperantista Asocio, Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Pola Esperanto-Asocio, Hungara Esperanto-Asocio kaj Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

La partoprenintaj delegitaroj traktis komuninteresaĵojn problemojn de la internacia Esperanto-movado, interŝanĝis spertojn kaj informojn pri la kunlaboro inter siaj landaj organizaĵoj, aparte substrekante la rolon de Esperanto en la internacia pacbatalo. Oni plue akcentis la neceson de sistema edukado kaj kvalifikado de esperantistaj aktivuloj, la esploron de la sciencaj aspektoj de Esperanto kaj la aplikon de la Internacia Lingvo por scienco kaj tekniko. La delegitoj interkonsentis pri aktivecoj rilatantaj la celebradon de la 1300-jara jubileo de la Bulgara Ŝtato en 1981.

La konsultiĝo notis sian maltrankviliĝon pri la akriĝo de la internaciaj rilatoj. Oni esprimis siajn esperojn, ke la tutmonda esperantistaro ne allasos negativajn sekvojn de tiu akriĝo.

La partoprenintaj organizaĵoj emfazis sian pretecon ĉion fari por harmonia pluevoluigado de la internacia Esperanto-movado, substrekante, ke necesas reciproka respekto de la interesoj, vidpunktoj kaj enlandaj labormetodoj.

La Konsultiĝo akceptis rezolucion solidare al la popoloj kaj la esperantistoj de Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio.

Al Bulgara Esperanto-Asocio la partoprenintaj delegitoj esprimis sian dankon pro la bonegaj laborkondiĉoj, kiuj ebligis intensajn kaj rezultodonajn traktadojn.

Sofio, 23.04.1980.

## NE NUR EN FRG...

Sen komentoj ni transprenas la artikolon "El la vivo de MEM" el la Pacaktivulo, n-ro 118/1980, ĉar laŭ nia opinio ĝi taŭgas ne nur por MEM-agado kaj ne nur por unu lando. Ni ja estas ofte en simila situacio. Prijuĝu mem, kara leganto!

-Informado estas grava tasko. Ne sufiĉas informi MEManojn pri la agado de la propra organizo, sed necesas informi la ekstermovadan publikon. Ekzistas la amas-medioj. Ili informas la ĝeneralan publikon. La problemoj ne nur en FRG estas, kiel igi ilin raporti pri Esperanto-aferoj?

Krome en FRG ni havas la problemon, ke Esperanto havas la figuston de sektismo kaj frenezeco.

La Esperanto-Movado /ligita al UEA/ dum longaj jaroj okupiĝis pri gazetara laboro. Prefere Ludwig Pickel, kiu eldonis semajnan informilon "Pilo-Press" kaj sendis ĝin al la amasmedioj. Tiuj kolektis la skribaĵojn en la arkivo kaj de tempo al

tempo uzis la materialon por malfavora, mokanta artikolo pri Esperanto. Post la morto de Pickel la Movado ne plu kapablis organizi similan servon kaj evoluigis alian sistemon: Letero de la leganto. Oni kolektas gazetteltranĉaĵojn kaj elsendojn, kiuj ebligas reagon de esperantistoj en formo de letero al la redakciejo. Kelkfoje la efiko estis sufiĉe longa diskuto pri Esperanto per leteroj en gazeto.

Sed tiu afero ne estas senproblema. La sektaj esperantistoj, kiuj ne nur ekzistas, sed ankaŭ viglas, formas per siaj leteroj la bildon pri Esperanto. La efiko nur estas pliprofundigo de la antaŭjuĝoj. Due la kontribuaĵoj ofte estas limigitaj al problemoj en la Europa Komunumo, por kio ili proponas Esperanton kiel solvon de la lingvo-problemo.

Tio estis la situacio, kiam MEM-sekcio FRG en 1978 decidis utiligi amasmediojn. Ni ne havis financajn rimedojn por informi pli ol dudek radio- kaj televidostaciojn, la dekojn da tutlandaj gazetoj, la milojn da regionaj kaj lokaj gazetoj, ne parolante pri centoj da revuoj semajnaj kaj monataj. Kaj eĉ se ni kapablus dissendi niajn informilojn al ĉiuj, ni ne kapablus kontroli, ĉu iu el niaj informoj aperis.

Sed ni ne bezonas informi ĉiujn. MEM, kaj tio estas avantaĝo kompare kun la neutralaj Esperanto-organizaĵoj, sin komprenas kiel parto de la internacia Pac-movado. Problemoj de Paco el la vidpunkto de MEM kutime ne estas traktata en la amasmedioj en FRG. Do, ne taŭgas doni al ili informon.

Aliflanke ekzistas certa aro da gazetoj kaj revuoj estanta en la t.r. "demokrata spektro", kiu koincidas kun la spektro de MEM. Nia tasko ja estas kaj varbi esperantistojn por la pacmovado kaj montri al la pacluktantoj la avantaĝojn de Esperanto. Per la "demokrataj" amasmedioj ni atingas 5 milionojn da personoj el la 60 milionoj. El ili ni elektis tiujn gazetojn kaj revuojn, kiuj estas a/ la plej konataj kaj b/ kontroleblaj, ĉar MEM-ano regule legas ilin. Al ili ni povis sendi samajn stultajojn, kiujn povas sendi al Burgaj amasmedioj. La kutimaj puŝraj informoj pri la Esperanto-movado ne havas valoron por ili. Nia tasko estis prezenti la Movadon kiel parton de la demokrata movado, ne kiel ludilon por sektuloj, sed ilon de pacluktantoj, praktikadon de internaciismo. La problemoj estas trovi en la movado taŭgajn novaĵojn, ĉar ni ja ne povas elpensi ion.

Jen kelkaj ekzemploj: Fine de 1978 aperis la konata glumarko "Atomenergio-ne, dankon!" en Esperanto. Tiun fakton ni ligis kun prelego pri atomenergio, kiun faris MEM-ano dum seminario de Germana Esperanto Junularo. La informilo por la gazetaro vekis ĉiujn impresojn, ke la esperantistoj ĉiuj estas aktivaj kontraŭuloj de atomenergio /utiligita por militaj celoj. Ĝi aperis en gazetoj.

La esperanto-grupo de Samarkand /Uzbekio/ petis materialon por porpeca ekspozicio. Post malgrandaj ŝanĝoj la informo estis taŭga kaj aperis en la du plej grandaj ĉiutagaj gazetoj. Tre bone uzebla estas la laboro de la Esp.fako de la naturamikoj, ĉar ili kutime estas kalkulitaj al demokrata spektro.

Krom tiuj informiloj por la gazetaro ni sukcesis aperigi kelkajn leterojn de legantoj, kiuj reagis al aliaj artikoloj. En la informilo ni kutime ne perdas vortojn pri Esperanto. Ni

nur mencias, ke ĝi estas facile lernebla lingvo. Ni kvazaŭ asertas, ke ĉiu redaktoro kaj leganto klare scias pri Esperanto.

Ni celas establigi Esperanton kiel memkompreneblan parton de la "demokrata spektro", kies parto ĝi objektivite estas. Homoj, kiuj sufiĉe ofte legas la vorton "Esperanto" ligita al aliaj vortoj, kiuj havas pozitivan signifon por ili, transdonas la pozitivan senton ankaŭ al Esperanto. Tio bezonas tempon, ĉar la leganto devas plurfoje vidi la vorton.

En la demokrata movado, kies parto ni, MEM-anoj persone estas, ni bone scias pri la ĝustaj vortoj kun pozitiva signifo kaj povas simple influi ofte la saman malmultan personaron. Nia celo estas, ke ĉutage la agado por E. ne plu estu senpolitika frenezaĵo aŭ nura hobbio, sed plene kaj serioze akceptota.

Estas videbla lumo ĉe la fino de la tunelo: En Karlsruhe oni invitis memkompreneble la Esperanto-grupon al unuiĝo kontraŭ Straus /reakcia politikisto celanta iĝi federacia kanceliero en 1980/, ĉar tie estas kelkaj personoj de la "demokrata spektro" lernintaj E. kaj uzantaj ĝin.

Roland Schnell

## BIBLIOGRAFIOJ PRI ESPERANTO

Bazo de ĉiu esplora laboro estas orientiĝo en la koncerna literaturo. Pro tio estas grave, ke tie, kie estas certa kolekto de literaturo pri aŭ en Internacia Lingvo, aperu ankaŭ bibliografio pri ili. Pasintjare aperis /en Romo kaj Lublin/ grava bibliografia verko, "Decimala katalogo de la planlingva literaturo ĉe Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato en Lublino /K.U.L./", 315-paĝa volumo kun la necesaj indeksoj, ellaborita de E.T. Wojtakowski. Samjare sekvis baldaŭ alia, "Bibliografio de la Esperanto-eldonaĵoj aperigitaj en Pollando 1945-1979" /Romo kaj Varsovio, s.eld. 1979, 29 p./, kies aŭtoro estas Irena Bednarz. Ankaŭ en Ĉeĥoslovakio komenciĝis similaj laboroj. En aprilo 1979 Ŝtata Scienca Biblioteko /SVK/ en Olomouc pretigis du bibliografiojn pri Esperanto-literaturo en siaj kolektoj. La unua /mendebla kiel R 799/ havas la titolon "Esperantská literatura 1900 - 1938 ve fondu SVK Ol" kaj listigas 90 poziciojn, la alia /R 800/ listigas literaturon el la postmilita periodo, estante titolita "Esperantská literatura 1946 - 1979 ve fondu SVK Ol". En Brno /1980/ speros pli ampleksa bibliografio pri Esperanto - literaturo en la Ŝtata Scienca Biblioteko en Brno /"Li-

teratura v esperantu ve fondu SVK v Brně"/. Ĝia eldonkvanto estos 300 ekzempleroj. Ĉar Brno estas la urbo, kie en 1901 estis fondita la unua Esperanto-societo de la tiama Aŭstrio, oni povas atendi, ke la verko enhavos ankaŭ raraĵojn.

/Por eventualaj mendoj ni menci la adreson de la biblioteko: Státní vědecká knihovna, Leninova 5-7, 601 87 B R N O./  
zh

## Kuriozaĵoj logikaj kaj nelogikaj

En la n-roj 4 kaj 5 de Starto 1979 ni povis legi intere - sajn artikolojn de Jaroslav Mařík. La unua temas pri uzado de akuzativo post la prepozicio "ĉe", la dua pri uzo de akuzativo anstataŭ la prepozicio "de". Ambaŭ tiuj nekutimaj kaj kurioze aspektantaj kombinoj estis parte uzitaj de Zamenhof mem kaj de kelkaj aliaj ne malbonaj aŭtoroj. Mařík atentigas pri tio, sen ke li tiujn dirmanierojn, cetere ĉe ni ĉeĥoj apenau aperantajn, mem uzadus aŭ rekomendus.

Mi opinias, ke atentigi pri ilia troveblo en nia literaturo estas nepre konsilinde. Ni ekzamenu, ĉu tiuj uzmanieroj estas bonstilaj kaj imitindaj. Mi ja antaŭe jam konstatis en miaj artikoloj, ke en lingva uzo de Zamenhof troviĝas kelkaj kontrabanditaj nelogikaĵoj, kiujn ankaŭ transprenis la normigaj PV kaj PIV. En kelkaj kazoj PG kaj PIV ne rekomendas imiti ilin, alikaze restas tiaj nelogikaĵoj kiel kuriozaĵoj aŭ lingvaj esceptoj sen averto pri evitindeco. Ja Zamenhof mem pligustigadis aŭ ŝanĝis kelkion el sia pli frua uzado. Kaj nia lingvo evoluas, kaj evoluu al plia precizeco kaj logikeco. Eĉ nia plej perfekta kaj konsultinda vortaro PIV ne estas absolute senmanka kaj submetotas al kompletigoj kaj pligustigoj /ekz. mankas vaste uzataj vortoj kiel burgo, darfi, k.a., negustas difino pri serpo ks./

En unu mia artikolo mi atentigis pri kelkfoje dusenca uzo de prepozicio "trans", nome en loksanga senco sen akuzativo: "Pensoj iras trans limo sen timo" anstataŭ logika "...trans limon". Same "ne devi" estas uzata de bonaj aŭtoroj laŭ Z kaj PIV en senco "devi ne..." /do havi devon/, kaj de aliaj lau la logika regulo, ke "ne" negas la sekvantan vorton, en senco ne havi devon.

Ni rigardu la uzon de "ĉe" kun akuzativo. Ĝi estas logika kaj defendebla, do ne erara. Samkiel ni povas diri "venu apud min", "venu inter nin", eblas diri "kuru ĉe lin". Tiu ĉi vere sporade uzata kombino povas necesakaze esprimi fajnan nuancon, kiel indikas J.M. en sia artikolo. Sed en 99% sufiĉas al ni prepozicio "al" /iru al ŝi, kuru al li/.

Anstataŭigo de prep. "de" per akuzativo ne aspektas bele kaj ŝajnas al mi stile nebona, estas kvazaŭ anglismo. Ĝi volas eviti plursencan uzadon de prep. "de". Sed tio eblas per

pli belaj manieroj, kiel citas Mařík, per kombino de du prepozicioj: de ĉe, de apud, de sur, de antaŭ, far aŭ fare de, ekde, depost, disde, for de ka. Mi opinias, ke nebonaj estas tiaj diroj kiel "mendado librojn", ĉar "mendado de libroj" estas ne dubenca, ĉi tie plene sufiĉas prep. "de". En aliaj kazoj ja eblas facile eviti tiun malplaĉan uzon per stila plibonigo de la frazo per enmeto de taŭga vorteto aŭ eta ŝanĝo de la frazo. Ekzemple el la cititaj: "Mi revis pri propagando inter vilaĝanaro sciencajn ideojn" ŝanĝeblas je bonstila "Mi revis pri tio, propagandi inter vilaĝanaro sciencajn ideojn". En la Z. frazo "Ĉi tiu konstanta kalkulado sin al ia speciala gento...", sonus pli taŭge "...konstanta sinkalkulado...", kiel ni havas prefiksiĝintan "sin" en aliaj verbaj substantivoj: sinmortigo, sindono, sinofero, sinteno ks. Kompreneble ni ne konsideru tiajn Zamenhofajn uzajn evitenda eraro, sed kiel ne rekomendatajn arkaismojn. PG en sia paragrafo 263 diras, ke tiaj uzoj "ŝajnas nur eksterordinaraj Zamenhofismoj". En la frazo "persekutado de la malamiko" eblas precizigi, kiu estas la persekutato per "persekutado far la malamiko" aŭ "persekutado al la malamiko". Kurta adverbo derivita transitiva verbo emmetebla antaŭ la akuzativon taŭge travidebligus la frazon: "persekutado cele /trafe/ la malamikon". Ja ni jam havas tiajn adverbojn, kiuj enkondukas akuzativon: rilate, koncerne, spite ion! Ekzemple frazon "Ni distancigas nin de ofendoj de la malamikoj" eblas laŭ senco pliprecizigi "ni distancigas nin de /disde/ofendoj al la malamikoj /cele la malamikojn/" aŭ ... de /disde/ofendoj far la malamikoj. Same eblas pli bonstile redoni la frazojn el Oomoto 1923:

la elekto la daton de la festivalo - la elekto cele la daton ... /pri la/ observado la japanojn - observado cele la japanojn ... studado la vivojn kaj agadon de... - studado cele la vivojn kaj agadon de ... distingado la karakterizajn manierojn - distingado cele la karakterizajn...

Mi opinias, ke per la ĝisnunaj lingvaj rimedoj eĉ sen enkonduko de nova prepozicio eblas esprimi ĉiujn nuancojn de la prepozicio "de". Tre ofte helpas precizige enmeto de konvena adverbo. Tiel ni kun d-ro Pumpur siatempe interkonsultis, ke la latineca ĉeĥa "dativo de intereso" en la frazo "a ona se mi vdaĵa" /Bezruč "Solfoje nur"/ estas taŭge redonebla per "kaj ŝi perde por mi edziniĝis". Por prozo tio ĉiam sufiĉas, ĉe verstraduko tio ŝtelas unu aŭ du silabojn, sed oni sin devas adekvate helpi.

Jiří Kořínek

J.Kořínek verkis la artikolon laŭ mia instigo. Mi kompreneble konsentas pri ĝia enhavo kaj nur akcentas, ke mi celis sole atentigi pri la ankoraŭa uzo, fare de iuj esperantistoj, de la, certagrade kurioza, anstataŭigo de la prepozicio DE post agsubstantivo per akuzativo /ekz.: mendado librojn/. Mi mem ne uzas tiun esprim-manieron kaj ne proponas al aliaj la uzon, eĉ se PIV, sub la termino "akuzativo", deklaras ĝin "klara kaj oportuna".

Jaroslav Mařík

## Pri unu pioniro

En la artikolo de B. Golden "La verko de Schleyer post 100 jaroj" /Starto 3/79/ estas menciitaj du volapukistoj, kiuj fariĝis esperantistoj: F.V. Lorenz kaj d-ro S. Lederer. Troviĝas tie ankaŭ mencio pri la unua gazetartikolo "Mluvnice svĕto-mluvy Volapŭk" el la jaro 1887, sed elfalis la nomo de aŭtoro de la artikolo, kiu verŝajne estis efektive la unua volapukisto en nia lando - J.M. Bakalář-Srbecký /nask. 16. 7. 1857/. Li estis pastro, paroĥestro en Angern apud Vieno. En multaj gazetartikoloj li propagandis la ideon de helpa lingvo inter ĉeĥoj kaj li laŭdire eldonis ankaŭ la unuajn ĉeĥajn lernolibrojn kaj vortarojn volapukajn.

Estinte la sola ĉeĥa propagandisto, li estis de ĉiu primokita, eĉ persone li suferis pro la belega kaj grava ideo. Pli poste li skribis pri tio /en La Progreso 5-6/1919/: "De la jaro 1887 mi laboras sur la kampo de la mondlingvo kaj de tiu tempo mi devis multe suferi de "niaj" homoj, kiuj ofte riproĉis min, ke mi propagandas la lingvon de socialistoj, kaj tiukaze - estante denunciita ĉe la Viena ĉefepiskopo Nagl - sen ĉiu ajn protokolo kaj sen gravaj motivoj oni donis minen pension kun negrava monsubteno kaj - mi preskau hontas tion konfesi - mi vivas en granda mizero... En la jaro 1887 aperis en Brno en gazeto "Correspondent" mia portreto kun rimarko "I-a diplomita instruisto de Volapŭk en Moravio" kaj tiam diris al mi episkopo Bauer en Brno: "Vi aspektis ĉie kiel leŭtenanto kaj ne kiel pastro - nia paŝtraro incitigis pro tio." Kaj tiam ĝi komenciĝis... Jam antaŭ la milito prof. Masaryk skribis al mi: "Vi estas viktimo de la sistemo..."

Kiam Bakalář-Srbecký ekkonis Esperanton kaj konvinkigis, ke ĝi superas la malperfektan volapukon, li publike deklaris: "Kiel homo honesta mi proklamas publike, ke multe pli plaĉas al mi internacia lingvo Esperanto ol Volapŭk. Al tiu el miaj samlandanoj, kiu volas okupiĝi pri efektiviĝo de ideo pri la tutmonda lingvo, mi decide rekomendas la lingvon Esperanto." Kaj leteron al Esperantista Klubo en Prago li finis per vortoj "Vivu, kresku, floru Esperanto! Ankaŭ en la jaro 1934 /La Progreso XV, n-ro 7/ skribis pri li O. Ginz, ke li loĝas en Podivín kaj vive interesiĝas pri la Esperanto-movado. Sed pri lia plua sorto /dato de lia morto/ mi ne scias.

Krom J.M. Bakalář-Srbecký ĉeĥan lernolibron de Volapŭk verkis J. Ivanovič /Svĕtořeč volapŭk ve třech lekcích-Mondlingvo Volapŭk en tri lecionoj, Brno 1887/. Ivanovič estis oficisto de la ĉefa stacidomo en Prago kaj ankaŭ li fariĝis esperantisto. Sed li mortis sufiĉe juna kaj ni devus ne forgesi lin. En la Biografio de Internacia Lingvo de Petro Stojan sub n-ro 5826 troviĝas mencio pri ĉeĥa lernolibro de Volapŭk verkita de M. Obhlídal, sed pri tiu ĉi homo kaj pri lia lernolibro oni scias tute nenion.

Jiří Patera

## por diskuto...

La "interna ideo" hodiaŭ kaj - hieraŭ

Pri la tiel nomata interna ideo de Esperanto aperis lastatempe kelkaj artikoloj kaj resuma studo en la Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Tiutema diskuto kontribuis sendube al la difino de la esenco de la "interna ideo", de ĝia loko kaj rolo en la movado.

Sendepende de tio, ĉu ĝi hodiaŭ perdis sian propagandecelan signifon kaj efikon, aŭ latentas en la movada solidareco, ĝia tasko plenumita en la unuaj jardekoj, kiam la movado ankoraŭ batalis por sia baza ekzistaro, estas nekontestebla. La koncepto de Zamenhof, nome, ke la diverslingveco estas grava kaŭzo de la interpopola malamo kaj reciproka miskompreno, en la impeto de la lingvo kaj ties movado plenumis siatempe gravan rolon.

Tion pravas la historiaj faktoj - en multnacia kaj multlingva Ruslando, kie la ideoj de Zamenhof precipe trovis favoran klimaton, estis en la komencaj jaroj la plej granda nombro da esperantistoj /tri kvaronoj de la abonataro de la gazeto Esperantisto/. Tiuj samaj ideoj fekundigis la unuan literaturan rikolton - ĝuste de la ruslandaj aŭtoroj. Estu menciitaj ankaŭ la unuaj eksterlandaj vojaĝoj de la rusaj esperantistoj - unu el ili estas nerekte ligita kun la fondiĝo de la Esperantista Klubo en Prago /1902/ - kiuj pruvis mirindajn eblecojn de senpera interkompreniĝo en la komuna lingvo. Ĉio ĉi kontribuis al vivanteco de Esperanto kaj ties movado.

Konsekvence do, la tn. interna ideo ne estas io imanenta sole al la personeco de Zamenhof, kiel povus sugesti la interpretoj de Drezen, kaj tiurilate estas riske trakti ĝian aŭtoron - kiu ja neniam sin konsideris legdonanto - aparte de la samtempa movado.

La "interna ideo" estiĝis natura apartenaĵo de la movado ankoraŭ apoganta sin pli je entuziasmoj ol aŭtoritatoj, de la movado, kies anoj foje mistike fidis pli al siaj fortoj ol al ekstera mondo - cetere starpunkto eĉ hodiaŭ propra al konservativaj esperantistoj.

Nedezirataj kaj negativaj manifestiĝoj de la "interna ideo" aŭ de ties interpreto, precipe ekster la movadaj medioj, tuŝas alian problemon, nome tiun pri la strikta ligiteco inter la interna konsciigo pri la celoj de la Esperanto-movado kaj ilia konigo al la cetera mondo. Konsciado de la esperantistoj pri la evolu-leĝoj de la socia vivo kaj ankaŭ de la propra movado estas instrumento, per kiu oni povas konkeri la novajn horizontojn por la Internacia lingvo.

Aliflanke - kvankam la metodoj kaj taktiko ŝanĝiĝis kaj la entuziasmon anstataŭis la pli raciaj klopodoj, la celo restas la sama. Kaj la emocia rilato al la misio de la lingvo kiel Esperanto ankoraŭ ne eliminas la objektivan interpretadon. Argumentante por tiu ĉi lingvo oni samtempe ne rajtas preterakcenti la faktojn, kiuj estas konsista parto de ĝia historio kaj sekve meritas esti traktataj komplekse. Ankaŭ la "interna ideo" meritas tion.

O.Kníchal

## NI PAROLU PRI FAKTOJ

Sub tiu ĉi titolo ricevis la redakcio de Starto insistan leteron de prof. Yves Guéguéniat el Villé, Francio, pri reformo de la E-a ortografio. La aŭtoro pledas por la libro "Optimala /laŭ PIV Optimuma/ Ortografio de la internacia lingvo E-o" far Albert Lienhardt, kiu proponas forigon de supersignoj. Aldonitaj artikoloj de P. Robiollé, prez. de Franca Fervojista E-Asocio, kaj de Bernard Thaillet esprimas konvinkon, ke nia lingvo ne venkos, se ĝi ne ŝanĝos sian "preskau ŝtonigintan" formon.

Ne unuafoje aperas tiu propono. La nuna aŭtoro mem mencias la de Zamenhof proponitan "reformon" el 1894 kaj Idon, sed mi memoras ankau pri propono aperinta antaŭ kelkaj jardekoj, en kiu oni romis la "malfeliĉajn" literojn "supersterkitaj". Kaj en Literatura Mondo aperis ankau reago de Kalocsay pri tiaj "plibonigoj" kaj Kalocsay mem ŝerce proponis la ŝanĝojn, kiuj laŭ mia opinio estis pli spritaj ol serioze intencataj.

La tekstopresa tekniko mejlopaŝe progresas, tial ankau la reformantoj havas pluajn argumentojn por siaj "plibonigoj." Unue tio estis presejoj, poste ankau skribmaŝinoj, kaj nun ankoraŭ teletajpiloj, komputeroj kaj elektronikaj tradukiloj. Ĉiuj tiuj teknikajoj malhavas E-ajn "ĉapelitajn" literojn, kaj havigi ilin estas laŭdire malsimpla afero. Tial la reformanto pledas por la angla alfabeto sen supersignoj kaj por uzado de literoj Q, W, X, Y. Li kalkulas 20 lingvojn/inter ili la latinan/, kiuj uzas la latinan alfabeton, sed li forgesas la albanan, irlandan, latvan, litovan, polan, romanĉan kaj aliajn naciminoritatajn. Ankau li diras, ke nur skribmaŝinoj fabrikataj por 7 lingvoj havas la "ĉapeleton"/cirkumflekson/.

Kia estas la stato en nia lando? La ĉeĥa lingvo havas entute 15 supersignitajn literojn. La presejoj estas provizitaj per la necesaj 30 tipoj/minuskloj kaj majuskloj/. Skribmaŝinoj estas aŭ kun 44 aŭ kun 48 literklovo, tiuj ĉi por kancelarioj, en kiuj oni tajpas ankau fremdlingvajn tekstojn. Ambaŭ maŝintipoj havas apartan klavon kun supersignoj kaj, uzatajn por tajpi la majusklojn Ĉ, Š, Ž, Á, Ě, Ī ktp. kaj la minusklojn ĉ, š, ž, á, ě, ĭ - tiuj ĉi estas relative malfortaj en la ĉeĥaj tekstoj. La 48-klava skribmaŝino havas ankau la francajn kaj, uzeblajn kaj por la majuskloj kaj por la minuskloj. Mi posedas 44-klavan porteblan maŝinon kaj mi ŝanĝigis ĝin: anstataŭ du ne tro necesaj signoj sur unu klavo oni enmuntis la klavon kun kaj. Do oni povas tajpi E-an tekston per niaj ĉeĥaj maŝinoj, kvankam ne per ĉiuj, kaj ne necesas havi apartan supersignon kaj por minuskloj kaj por majuskloj, kiel opinias s-ro Guéguéniat.

Kiam ĉeĥo ricevas telegramon, en la teksto mankas ĉiuj supersignoj, kaj tamen oni komprenas. Simila afero estas ĉe u-

zado de teletajpilo kaj komputero - la supersignoj mankas. En la slovaka kaj aliaj lingvoj la situacio estas simila, kaj tamen oni forigis nek super-, nek sub-, nek tra - literajn signojn en iu lingvo.

Tial mi pensas, ke oni povas trakti la E-ajn supersignitajn literojn simile kiel la ĉeĥajn. En kazoj de ebla miskompreno oni uzu la manieron rekomenditan de Zamenhof mem: ŝi - ŝi, ĝi - ĝi, ĉelo - ĉelo ktp. Tion prof. Guéguéniat konas, sed trovas ĝin malkonvena. La telegramoj, tekstoj teletajpitaj kaj pretigitaj per komputeroj estas destinitaj por limigita nombro da legantoj /ofte ĉe nur por unu/, oni ne rajtas do trograndigi la maloportunaĵon tiamaniere estiĝantan.

Generala enkonduko de nova E-a alfabeto signifus ankau senvalorigon de kompleta ĝisnuna literaturo, kiun la presejoj presis malgraŭ la "maloportunaj" ĉapelitaj literoj.

Adolf Staňura  
prezidanto de lingva komisiono  
de Ĉ E A

## ni recenzas

**SEKSO KAJ EGALCO** - jen titolo de nova revuo eldonita en Nederlando. Ĝi raportas pri virina agado kaj batalas por seksa egaleco, ĉar ĝenerale virinoj iĝas viktimoj de diskriminacio. Jes, mi bonvenigas porvirinan revuon, ili ja ekzistas en tre multaj landoj kaj estas ŝatataj ne nur de virinoj. Ĝenerale ili havas tute nerevoluciajn, ĉe poetikajn nomojn /Ni virinoj, Ŝi, Klaraj horoj ktp./, kvankam la enhavo estas politike kaj sociale grava. La titolo "seksa kaj egaleco" evidente celas klare kaj senkompromise montri, kion oni volas. Sola "egaleco" verŝajne ne sufiĉas, ankau se la revuo ne estas nure porvirina. Bedaŭrinde, ke aŭdinte vorton "seksa" oni havas senton iom tikleman.

Tralegu iom la enhavon de la provnumero. Raporto pri laboro de svisa virina organizaĵo, pri vivo de virinoj en Hinda Unio, virina laboro en Esperanto - movado, informoj pri Komisiono pri virina agado de UEA, pri laboregaleco en Francio, propono pri oratora konkurso por virinoj.

Interesaj estas gramatikaj paĝoj, nome artikolo "Egaleco kaj internacia lingvo" de Ole Hagemann, Danlando: en statuto de UEA oni parolas pri prezidanto - li prezidas la estraron, li rajtas delegi komitatanojn ktp. Uzo de vira pronomo en ĝenerala signifo estas neoportuna, ĉar ĝi inkluzivas virinojn. Por eviti tiun malagrablaĵon, la aŭtoro de la artikolo proponas kelkajn solvojn, el kiuj li substrekas uzadon de nova komunseksa pronomo "ri". Tio estas fakte perfekta solvo kaj mi senpacience atendas, ĉu ĝi vere estos uzata kaj ĉu per tiu-ĉi pronomo estos solvita ankau problemo de virina diskriminacio.

Do, eldoniĝos nova revuo por ĉiuj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la traktataj temoj. Ni atendu, kion novan ĝi alportos.

Dr.Barandovská

**"LA INTERNACIA LINGVO : SCIENCAJ ASPEKTOJ"**-nova scienca libro

Centra Laborrondo Esperanto eldonis antologion de sciencaj studoj sub tiu ĉi titolo. La 235-paĝa verko estas redaktita de Detlev Blanke kaj entenas plejparte prelegomaterialojn de la internacia scienca seminario "Sciencaj aspektoj de Esperanto", kiu okazis de 17a ĝis 23a de aprilo 1978 en Ahrenshoop. Krome eniris diversaj aliaj studoj. La libro dividiĝas je 4 partoj:

Ia parto "Internacia lingva komunikado kaj interlingvistiko"

IIa parto "Scienca priskribo de Esperanto"

IIIa parto "Scienca apliko de Esperanto" kaj

la IVa parto entenas kiel aldonaĵon la komunikon pri la internacia seminario kaj adresaron de la kontribuintoj.

**AL ABELUJO ĜI FLUGAS.** Elektitaj poemoj de estona poeto Juhan Liiv /1864 - 1913/. Elektis kaj tradukis Hilda Drezen, redaktis Jüri Talvet, la antaŭparolon verkis d-ro Aarne Vinkel, ilustris Heral Eelma. Eldonejo "Eesti Raamat", Tallinn, 1980. Paĝoj 160.

Antaŭ mi kuŝas impona libreto enhavanta 122 elektitajn poemojn de klasikulo de estona literaturo kaj poezio Juhan Liiv. Homo trasuferinta pezan vivon, de junago persekutita de malsanoj, kiuj lin apenau tridekjaran komencis mense stragoli kaj lasis lin lastajn dudek jarojn vegeti sur margeno de estado - traluktis sin per sia talento al unu el la fruntaj lokoj de estona literaturo. En tiu ĉi poemaro li elkanstas sian profundan vivmalĝojon kaj sian ardan amon al sia naska Estonio dum jarcentoj tiom suferinta. Majstre parolas ĉi tie koro poeta en plejparte klasikformaj poemoj de alternaj kvalitoj, inter kiuj aperas veraj juveloj de unika ĉarmo, kiel "Ĉe erikejo", "Floro" k.a. Eĉ modernversaj liberversaj frandaĵoj, kiel "Poeto", ne mankas. Estona brava popolo nombre negranda, liveras ĉi tie florojn de belo per Esperanto al la tuta homaro. Kvankam mi ne povas prijuĝi la fidelecon de la belversaj tradukoj, la nomo de nia elstara estona poetino Hilda Drezen garantias certe optimume artisme bonan repoezigon. En siaj redonoj sterniĝas antaŭ ni la estona pejzaĝo, ĉirkaŭas nin erikejo, blanke salutas nin betuloj, ondas antaŭ ni la Balta maro, ploras al ni ankaŭ iama mizero.

Mi rekomendas la libreton al ĉiu literatur- kaj poeziamanto. Agrable surprizas la modela lingvaĵo kaj foresto de iu ajn preseraro.

Jiří Kořínek

La libron eblas antaŭmendi ĉe la librovendejo de ĈEA, prezo ĉirkaŭ 7 Kčs

# KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-avolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila montado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs  
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs  
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs  
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo

1-2 semajnoj liveras

## INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.

# KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj  
ĝardenistaj tondiloj de diversaj  
tipoj  
tondiloj por la kureja prilaboro  
de kortbirdoj  
higiena ilaro - ungo-fajliletoj  
- raspiletoj por la  
malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR  
Eksportas MERKURIA Praha

daŝeroj /en trafiko "Stop!"/. La flavo, simbolo de la suno, oro, riĉeco, abundeco - estas ankaŭ koloro de malsano, kvarenteno /sur ŝipoj/. Klasika ekzemplo estas diversa klarigo de blanko kaj nigro: en Eŭropo la blanko esprimas ĝojon kaj la nigro triston: en Ekstrema Oriento la koloroj havas tute malan signifon. La verdo ne estas sole koloro "de espero" /kaj de Esperanto/ - sed preskaŭ internacie ĝi estas uzata por limdefendaj trupoj sur maro kaj en dogana servo. Ankaŭ ĝi estas simbolo por "libera vojo".

Sur la flagoj ni ne serĉu nur simplan fetiĉan klarigon. Ekz. iam /ĉirkaŭ 1920/ oni tiel klarigis la enhavon de ĉeĥo-slovaka flago/blua kojno inter blanka kaj ruĝa strioj/: "Nia libereco /blanka/ naskiĝis dum sangaj bataloj /ruĝa/ en blua malproksimeco". Fakte nia flago simbolas bonvolan kunigon de la ĉeĥa regno /blanka-ruĝa/ kun slovaka regiono /blua simbolo de slovakaĵo montaroj = kojno/. Simile oni klarigas la signifon de la germana demokratia flago: "El nigra pasinteco trans sangoplenan /ruĝa/ batalon al ora estonteco". Fakte la flago ripetas la kolorojn de la uniformoj de Lützow-trupo batalanta kontraŭ Napoleono en 1813. Kaj la imperiestra germana flago /fig. 26-28: nigra-blanka-ruĝa/ estas kunigo de la prusaj koloroj /nigra-blanka/ kaj tiuj de Hansa-urboj /blanka-ruĝa/. Simile okazis en Belgio /fig. 29-31/, kies flago estiĝis ĉirkaŭ 1830 dum la revolucio kontraŭ Habsburgoj - el la flagoj de Brabanto /nigra-flava/ kaj Henegovio /flava-ruĝa/.

Tio signifas, ke la simboliko en nuntempo fakte estas tre duba afero - kaj tial dubinda. En nia raciema tempo jam la fetiĉoj malaperas - kaj ankaŭ ni, esperantistoj, ne povas stari flanke de tiu ĉi logika procedo. Des pli, se ni volas respekti ankaŭ diversnaciajn leĝojn. Ekz. en Brita Komunumo la koloroj de la ŝtatflagoj estas severe legigitaj - la flago de Pakistano /fig. 32/ ne estas simple "verda", sed "tardan-verda": la koloro ankaŭ havas sian numeron BBC 26.

Iom da tekniko: La fundamentaj koloroj /nemiksitaj/ estas sole tri: flavo, ruĝo kaj bluo - la verdo estiĝas el mikso de flavo kaj bluo. La verdo tial povas esti aŭ "pli flava" aŭ "pli blua" laŭ tio, kiu fundamenta koloro el tiuj ĉi du superas la alian.

Vi vidas, karaj gesamideanoj, ke la verdaj koloro aŭ stelo havas multsignifan klarigon ankaŭ en la oficiala ŝtata heraldiko kaj veksilologio. Bonvolu auskulti ankoraŭ unu "fabelon" pri la deveno de Esperanta verda stelo: Oni asertas, ke ĝi estis origina signo /"signet"/ de la libro-eldonejo Hachette, kiu estis komence de nia jarcento unu el la plej favoraj eldonejoj de Esperanto-literaturo. Sed tiu ĉi "fabelo" ne estas pruvita.

Ofta argumento de konservativaj esperantistoj por la tro-uzado de la verda stelo estas, ke ĝi estas "fabrika marko" de nia movado aŭ io simila. Ankaŭ la simboloj nomataj "fabrikaj markoj" estas submetitaj al specialaj leĝoj kaj normoj. Ili

devas esti antaŭ ĉio registritaj: tial ili estas neŝanĝeblaj kaj ofte ankau iliaj koloroj estas severe difinitaj. Ekzemple la mondfama marko SKODA PLZEN /fig. 33-34/ estas difinita per speciala fabrika normo /inkluzive kolorojn/ kaj internacie registrita. Ankau la rilato de la grafika marko kaj de ĝia vortalernaĵo SKODA estas normigita. Oni ne povas ĝin uzi ĉie - kaj la alia teksto povas esti lokita en triobla distanco de ĝia diametro. La samon oni ne povas aserti pri nia Esperanta verda stelo kun "E" en centro. Nurla flago estis difinita en 1970 /fig. 35/.

Mi volis montri al vi, karaj gesamideanoj, ke en la longa vico de jarcentoj la fenomeno "koloro" en simboliko estas vere nur "simbola" kaj ke ni ne devas eviti sobran buntecon en la ekstera formo de nia propagando.

Multon da sukcesoj en via merita laboro por Esperanto deziras al vi

metodika-propaganda komisiono de ĈEA.

#### Rimarko:

Veksilologio /= flagscienco/ - proponita al ISAE kun difino: Scienco pri flagoj kaj standardoj, helpa scienco de historio /a: vexillology; g: Vexillologie; f: vexillologie; ĉ: vexilologie/. Unuafoje uzita en Heraldiko-Veksilologio-Terminaro en Esperanto de J. Klement 1979. Analoge "veksilologiisto" = sciencisto pri vexilologio.

#### Literaturo:

Jaroslav KLEMENT: HERALDIKO-VEKSILOGIO-TERMINARO EN ESPERANTO; eld. loka grupo de ĈEA Karlovy Vary 1979 /1-a eld./

K. A. IVANOV: FLAGOJ DE LA ŜTATOJ DE LA MONDO; eld. Transport, Moskvo 1971.

Jiří LOUDA: BLAZONOJ DE ĈEĤOSLOVAKAJ URBOJ; eld. Mladá fronta, Prago 1975.

PEDERSEN-PETERSEN: INTERNATIONALES WAPPEN- UND FLAGGENLEXIKON IN FARBEN; eld. Universitas-Verlag, Berlino 1970.

RNDr Ludvík MUCHA: FLAGOJ KAJ BLAZONOJ DE LA MONDLANDOJ; eld. Kartografie, Prago 1975 /II-a eldono 1977/.

Informilo "VEXILOLOGIE" - eld. ekde 1972 Obvodní kulturní dům Praha 3, organo de Ĉeĥoslovaka Veksilologia Klubo.

Lingve kontrolis: Josef Vondroušek, Brno.

## internacia panoramo

HUNGARIO. Siatempe ni anoncis, ke 140 hungaraj deputitoj proponis en la jaro 1976, ke Kultura Parlamenta Komisiono pri-traktu kaj analizu la lingvajn problemojn en la internaciaj rilatoj kaj la eblan rolon de Esperanto en ili.

En decembro pasintjara reprezentantino de la ministerio por lernejoj d-rino M. Hanga, vicministrino, tiun raporton prezentis al la jam menciita komisiono. Al la raporto esprimigis pluraj parolintoj. Ĉiuj konsentis kaj samtempe ĉiu el ili la raporton kompletigis ĝenerale kaj per novaj sugestoj.

Ministerio de instruado permesas arangi kaj stabiligi juran staton de la lerneja Esperanto-instruado kaj kontentigi realajn postulojn.

Laŭ Budapeŝta Informilo La dekreto de ministro pri Edukado-kiu aperis en marto 1980, permesas la instruon de E. ankau en elementaj lernejoj / ne nur en gimnazioj, kiel ĝis nun/ de la tria klaso ĝis la oka ! Esperanto tie estas egalrajta al iu ajn fremda lingvo, elekt-ebla / deviga studobjekto. Tiu studhoros estos envicigita en la koncerna semajna stud-horaro, la instruisto pagata de la ŝtato.

Informo de E.Cziszár

UEA. Universala Esperanto-Asocio inaŭguris en decembro pasintjara novan oficejon en Novjorko por firmigi la rilatojn kun UN. La inaŭguron partoprenis multaj gravaj oficialaj personoj, reprezentantoj de la neregistraj organizoj k. a. UEA nun intencas fondi novan pluan oficejon en Budapeŝto.

JUGOSLAVIO. Esperanto-Asocio de Bosnio kaj Hercegovino ricevis en novembro p.j. altan ordenon pro meritoj por la popolo kun argenta stelo, laŭ decido de prezidento J.B.Tito, al la 30-a datreveno de ĉi tiu tre vigla organizo.

#### 36a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO en RAUMA, Finnlando

/25.7. - 1.8. 1980/

Televido faros programon pri la kongreso. La Finna Televido sendos al la kongreso kameragrupon. La filmitan materialon oni uzos en speciala pri-Esperanta programo, dissendota en aŭtuno. Versajne temas pri unika kazo en historio de la Internaciaj Junularaj Kongresoj. - Ankau la tutlanda radio atentos Esperanton pro la kongreso: oni preparos programon pri diverslandaj Esperantaj disaŭdigoj mallongondaj.

La Alta Protektanto de la kongreso estas guberniestro Paavo Aitio, persono tutlande konata. Akceptante la taskon la 25-an de februaro, guberniestro Aitio esprimis sian altan aprezon pri la agado de esperantistoj por internacia interkomprenigo. La Kongresa Libro enhavos lian personan saluton al la kongresanoj.



## Kongresoj de Esperantaj organizaĵoj

Trilende Esperanto-Konferenco/Aŭstrio-Italio-Jugoslavio/ okazis de 23.5-25.5 en Udine, Italio

Jubilea Kongreso de Bulgara E-ista Asocio de 12a - 14.7.1980 en Plovdiv

Hispana Esperanto-Kongreso de 19a - 24.7.1980 en Madrid .

Kongreso de Japanaj Esperantistoj de 23a - 24.7.1980 en Yokohama

Kongreso de KELI de 26a - 2.8.1980 en Södertälje, Svedlando.  
Kongreso de AE SSR de 27a - 29.6. okazis en la orienta slovena urbo PREŠOV.

Kongreso de Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio de 25.7-1.8.1980 en pola urbo Bydgoszcz.

53a Internacia Kongreso de SAT okazigos dum 19a-25.7.1980. en jugoslava urbo RIJEKA. Eblas aligi kaj partopreni pere de vojaĝagentejo ČEDOK, kongresa fako.

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj de 9a-18.8.1980 en sveda urbo Börsen

### El junulara esperantista movado

UEA proponis el TEJO, ke ĉiu nova membro de TEJO inter 10 ĝis 18 jaroj ricevas automate dujaran membrecon kontraŭ pago de 1-jara kotizo.

Internacia Infana Esperanto-vilaĝo de 20.7 - 1.8.1980 en pola urbo Funke.

Internacia Infana Renkontiĝo de 8.-13.10.1980 en Zagreb, samtempe tie okazos la 13. Pupteatra Internacia Festivalo.

En München 20.000 interesuloj vizitis la junularan informforon, kie R. Majer prezentis magiaĵojn kaj Esperanto-lecionojn.

En Sovetunio jam ekde 1979 jaro en la pionira klubo ARTEK en Krimeo sukcese funkcias Esperanto-rondeto, al kiu partoprenas pli ol 90 infanoj.

Unu el plejaktivej lokaj junularaj grupoj en la Svislando estas la E-junularo Zürich.

Kubo startas ankaŭ en Esperanto. La 2.2.1980 okazis kursfina preĝo en la teatro HUBERT de BLANCK. Ĉirkaŭ 500 gelernantoj, ĉefe junaj, ricevis sian ateston de enkonduka kaj meza niveloj. La 11.2. komencigis nova kurso por pli ol 1.000 gelernantoj.

## I L E I - SIMPOZIO en la universitato LA SORBONNE

En la tagoj 18-a ĝis 20-a de oktobro 1979 okazis en la Universitato de René Descartes /La Sorbonne/ en Parizo simpozio pri la problemoj: "Ĉefaj kondiĉoj por universala eŭropa lingvo." La simpozion partoprenis personoj el Francio, Italio, Bulgario, Belgio, FRG, Sanmarino, Britio kaj Nederlando. La konferenco akceptis jenan rezolucion:

-La partoprenintoj de la Simpozio "Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia - eŭropa lingvo", okazinta en la Universitato René Descartes - La Sorbono, Parizo inter la 18-a kaj la 20-a de Oktobro 1979, priesploriginte kaj pridiskutinte, la nunan staton kaj estontajn perspektivojn de la interlingva problemaro, konstatis ke la intensigo de internaciaj kontaktoj kaj normalajn interrilatojn de homoj parolantaj diversajn lingvojn ĉiam pli akre malhelpas la manko de komuna lingvo, ke tiun rolon povas plenumi nur politike neŭtrala, facile alproprigebla internacia lingvo, kaj ke la internacia lingvo Esperanto dum sia pli ol naŭdekjara vivo perfekte pruvis sian taŭgecon en ĉiuj funkcioj postulataj de tia lingvo, proponas al UNESKO renovigi siajn konstatojn kaj proponojn formulitajn dum la Ĝenerala Asembleo okazinta en la jaro 1954 en Montevideo; al la Eŭropa Parlamento meti sur la tagordon de sia venonta Asembleo la temon pri la komuna Eŭropa interlingvo kaj komisi al speciala faka komisiono prilabori dekjaran perspektivan planon pri la solvo de la problemoj.

La Internacia Ligo de Esperantistoj posedas riĉan eksperimentan materialon, kiun ĝi povas liveri al la organizanta komisiono kaj ĉi-ĉele ĝi mem proponas siajn servojn.

La informon ni ricevis de la Ĉeĥoslovaka komisiono por UNESKO.

## KRONIKO

La 7-an de julio ĝisvivas meritplena sekretariino de LG en Třinec Anna MILATOVÁ sian rondan jubileon. Ni ĉiuj deziras al la jublantino en sia plua vivo multajn sukcesojn kaj firman sanon.

En pasinta jaro en Třinec

forpasis kvar konataj gesam-ideanoj: E. Blahutová, M. Medvecká, P. Kohutek kaj L. Hrochová. Ili meritas nian dankeman rememoron. JP

S-ano František TICHÝ /1926-1980/, oficiisto, mortis post longa grava malsano la 18-an de marto en Slapanov. Lerninte E en sia junaĝo li energie subtenis ĝin ankaŭ kiel kuregvidanto kaj longjara D de UEA

VH

# RONDETA VIVO

FRÝDEK-MÍSTEK - La 20.4. 1980 okazis en kafejo ESPERANTO parolado de D.Pustka pri la temo:Konstruisto de koaks-baterioj. Post la parolado sekvis filmo "FIAT sin prezentas."

BRNO - La 15.4.1980 aranĝis EK solenan Vesperon de kantoj, arioj kaj baletu rememore kaj omaĝe al la 35-a datreveno de liberigo de Brno kaj Ĉeĥoslovakio kaj por ĝoji el la paco, kiu antaŭ 35 jaroj finigis la terurajn jarojn de la dua mondmilito. Preparis, rolis, gvidis la tutan riĉan artisman programon prof.H.Supová - Halířová kaj pluraj eminentaj anoj de Ŝtata Teatro en Brno, el Granda Baletu de Janáček - opero, auskultantoj de JAMU kaj premiitaj lernantoj de Lidová ŝkola umění, Brno-Král. Pole. Plenplena salono, sukceso kaj aplaudo grandega.

## MNICHOVO HRADIŠTĚ

Dum estinta 700-jara urba datreveno oni konstatis laŭ arkivo, je jam dum jar 1930 estis fondita Esperanto-klubu. Pro tio dum la tagoj 16-18a de majo solenis rondeto esperanta sian la 50-jaran datrevenon. Por partopreni ili invitis multajn favorantojn kaj ankaŭ legantojn de ilia bulteno VERDA FAMILIO.

## ROUDNICE nad Labem

Eva Seemanová kaj Jiří Karen preparis vesperon de poezio en Kultura Domo de Ŝtadikatoj en la nia urbo 13a de februaro. Sur la foto ambaŭ aktoroj.



ŠUMPERK - La jarkunvenon ĉeestis 24 geklubanoj. Al programo kontribuis la infanoj de E-interesrondeto ĉe la Urbadomo de junpioniroj, kiu estis establita fine de novembro 1979. Gvidas ĝin sam. O.Müllerová. Vidu la foton.



ZNOJMO - EK aranĝis la 10. 4. 1980 "Vesperon de Esperanto" kun kultura programo, bildkar-ta ekspozicie kaj parolado de s-ano Polák pri KUBO kun koloraj diapozitivoj. Granda partopreno.

V.R. ŽAMBERK - LK okazigis 19.4. komunan kunvenon por ĉirkaŭaj esperantistoj, kiuj venis malgrau malbona vetero el Č. Třebová, Svítavy, Lanškroun, Polička kaj Litomyšl. En Letohrad oni vizitis la naskiĝdomon de P.Jilemnický, programe sekvis raportoj pri kursoj, agadplano por majo-junio, aukcio, konkurso kaj tombolo. K.Č.



Por ĉiuj 25 jortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Josef KREJČÍ, 31-jara seruristo, Školní 693, BL U D O V /CS 789 61/ deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi BI.

Komencantino, oficistino, 32j. deziras korespondi pri ĉiu temo kun amikino el GDR. Mia adreso: S-ino Alena Kuchtičková, str. Kopeckého 839/8 CS-570 01 LITOMYŠL

40-jara ekonomistino serĉas korespondant/in/on en Prago. Ursula KOTZSCH, 8060 DRESDEN Grossenhainer Str.14b, DDR.

Geedzoj-biologistoj Janina kaj Andrzej Małasowski kun 8-jara Joanna deziras korespondi kaj interŝanĝi PM kaj PI. Adreso: 58-309 WALB - RZYCH, str. Hirszfelda 4m.13 POLLANDO.

Albena N. Valkova, 5957 ASENOVO, Plevensko, BL. Ananjin Andreo, bv D. Engelsa, d.10, kv.85 SU-400 112 Volgograd o Irina Parachina/18j str. D. Bjednovo, 15-16, SU-400065 Volgogradu Anstolij Urusov, str Udmurdskaĵa, 22-115, SU-400055 Volgograd.

Mi aĉetos aŭ interŝanĝos ĉion eldonitan pri aŭ en Esperanto: librojn, gazetojn, insignojn k. s. Mia propono konstante validas. Karel NOVÁK, Třebícho - vická 194, Svinařov, CS-273 05 Smečno.

## JULIUS FUČÍK:

### RIPORTO SKRIBITA EN LA PENDUMILA MAŜO

Julius Fučík /23. 2. 1903 - 8. 9. 1943/, ĉefa nacia heroo, elstara politika aganto de Komunista partio, verkisto, ĵurnalistoj kaj literatura kritikisto, honorigita per la premio de Monda Packonsilio en 1952.

Dum la nazia okupacio li fariĝis membro de ilegala CK KPC gvidante la eldonagadon de la komunista rezistmovado. En 1942 li estis arestita de la gestapo kaj la sekvan jaron ekzekutita en Plötzensee apud Berlino.

Lia verko el la nazia malliberejo aperis en 1945 sub la titolo "Riporto skribita en la pendumila maŝo" - Reportáž psaná na oprátce. Ĝi estis tradukita en pli ol sepdek da lingvoj. Esperantan tradukon de tiu ĉi libro plenumis Rudolf Hromada en la jaro 1951.

Mendu ĝin ĉe Ĉefa Esperanto-Aso-cio, Jilská 10, 110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Prezo: Kčs 25,- au 10 gld.




# el leterkesto

Estimataj geamikoj, Vladivostoko 1980 03.07.

Al via Asocio turnas sin gvidanto de Esperanto-sekcio ĉe Ekstrem-Orienta ŝtata universitato. La E-sekcio ekzistas en nia urbo la unuan jaron.

Por disvastigi niajn internaciajn ligojn la sekcianoj dezirus ekhavi amikajn ligojn kun ĉefaj samideanoj. Ni povas interŝanĝi ĉiuspecajn esperantaĵojn. Do, mi petas vin helpi al ni pri starigo de tiuj kontaktoj, kiuj povas esti sur kolektiva bazo samkiel sur la individua.

Korespondadreso: Sergej ANIKEJEV, Av.100 let Vladivostoku-78-22 SU - 690049 V L A D I V O S T O K - 49, USSR



Estimataj redaktoroj,

amiko J.Mařík sendis al mi kopion de sia letero al vi, kie li respondas mian artikolon en Starto 1/1980 pri "ĉe" kaj "apud".

Dum mia longjara instruado de Esperanto mi devis ĝin funde trastudi kaj ankaŭ konsulti kun spertaj esperantistoj. Precipe mi interesiĝis pri sufiksoj kaj prepozicioj, ĉar ili estas "ligiloj" de la frazo.

Prepozicio "ĉe" signas rilaton /malmoderne "tuŝeĉon"/. La ekzemplojn mi montris en mia artikolo. Tie mi ankaŭ skribis, ke Esperanto havas sian propran spiriton. Mi miras, ke Benešov ĉe Praha estas ne komprenata, ĉar ĝi estas nomo de urbo, sen indiko de apudeco. Oni povas skribi: Benešov ĉe Praha, 40 kilometrojn apud Praha. Same mi prave uzis: Ústí ĉe Orlice /ne "super Orlice" aŭ "apud Orlice"/. Sed mi mem estas kontraŭ esperantigo de nomoj - tial mi uzas "Praha" kaj ne "Prago". Esperantistoj de aliaj nacioj uzas nomojn en origino, krom ĉefaj urboj. Traduku ekz. Dolní Mokropsy - Malsupraj Malsekhundoj! En suda Bohemio ni havas urbon Kamenice nad Lipou: ĝi estas absurda eĉ en ĉefa lingvo, ĉar urbo povas esti sub, sed ne super la arbo. Eĉ ĉe la personaj nomoj estas dubinde uzi fonetikan transskribon, ekz.: Shakespeare - Sekspir.

Do, mi revenu al nia Benešov-demando: Benešov nome restu "Benešov u Prahy" kaj ne "ĉe Praha" aŭ "apud Praha". La frazo /propozicio/ en mia artikolo estis nur ekzemplo.

La frazo: "Mi studas en universitato" signifas, ke mi studas en iu universitato. Sed "Mi studas ĉe Oxford universitato" indikas precizan universitaton. La artikolo "la" ne estas necesa, ĉar laŭ Fundamento antaŭ nomoj oni ne uzas artikolon.

/Laŭ Fundamento estas pli bone per artikoloj ŝpari ol hazardi/. La artikolo ofte anstataŭas substantivon, ekz.: "Mia patro estas profesoro, la via estas laboristo".

"Nacio" estas gento, "popolo" estas homoj sen diferencigo de nacio. Mi volis montri la naciojn, kiuj vivas en kadro de aliaj nacioj. Ĉiu el ili /piejofte temas pri nacia malpli-multo/ havus sian propran "nacian komitaton" /por defendi siajn naciajn rajtojn/. Sed komunumo de ĉiuj havas "popolan komitaton".

Kelkaj ekzemploj por "ĉe" kaj "apud"/laŭ Plena gramatiko/:  
ĉeesti - esti ĉe apudesti - esti apude  
ĉeesti kunvenon apudesti kunvenon

La unua termino signifas: partopreni, la dua signifas esti apud /eble en alia ĉambro/.

Do, karaj redaktoroj, juĝu mem. Amiko Mařík argumentis kaj ankaŭ mi argumentas. Mi ĉiam asertas, ke Esperanto ne estas ankoraŭ plene eluzata laŭ eblecoj, kiujn ĝi, laŭ Fundamento, al ni donas./Ekz. ni diras: Longa tempo, japanoj diras Multa tempo. Laŭ mia opinio japana ekspliko estas pli logika/.

Samideane salutas A. Slanina

## Lingva angulo

En la lastaj numeroj de STARTO vi povis sekvi diskuton pri la lingvaj demandoj. En tiu ĉi numero vi legis leteron de S-ro Slanina /vidu El leterkesto/ kaj pere de letero de nia koreakta lingva spertulo J.Kořínek ni finos tiun interesan debaton. Jes, ni sammaniere opinias, ke "oftas ĉe iuj esperantistoj konvinko, ke pro iaj/ ofte nedisputeblaj meritoj pri disvastigo de Esperanto oni nepre ankaŭ ĉiam pravas en lingvaj demandoj ..... Sed prijugu vi mem !

Ne decidu subjektivaj opinioj

Oftas ĉe iuj esperantistoj konvinko, ke pro nedisputeblaj meritoj pri disvastigo kaj progresigo de Esperanto oni nepre ankaŭ ĉiam pravas en lingvaj demandoj. Post apero de artikolo de Antonín Slanina en la 77-a n-ro de Starto kelkaj homoj, dubante pri la gusteco de iuj el la deduktoj, demandis min pri mia opinio. Ne gravu ĉi tie mia opinio, sed reguloj de la lingvo, precipe de la normigaj verkoj PIV kaj Plena Gramatiko /PG/. Laŭ tiuj ĉi ne estas korekte esprimi proksimecon de kelkaj kilometroj en la surteraj cirkonstancoj /do ne parolante pri kosmaj distancoj/ per la prepozicio "ĉe", kaj ĉi tie taŭgas "apud" aŭ "proksime de". Do ĝuste estas "Benešov apud Praha", Chabařovice apud Ústí nad Labem ks. "Ĉe" signifas laŭ PIV A-1 "en la spaco: objekton tute proksiman". Do se ekz. la lokon trafluas rivero oni diras "Ústí nad Labem situas ĉe Elbo, Prago situas ĉe Vltavo /aŭ Vltave/, Bulonjo ĉe la maro ks. Neniu el la pluaĵ signifoj

de "ĉe" laŭ PIV, A 1-4, B 1-7, C, D 1-4 parolas pri "rilato", ankaŭ PG en parag. 317, 321 emfazas diferencon inter ĉe kaj apud tiel, ke "ĉe" montras tuŝan proksimecon, "apud" ne tuŝan /ĉe lokindikoj/. Do ĉi-rilate la klarigo de A.S. ne estas ĝusta. Ĉi tie mi volus menci, ke en la adresoj kompreneble tekstas la loknomoj en la lingvo de la koncerna lando, do: Paris, Roma, München, Praha, Ústí nad Labem ktp. Sed en la Esperantaj tekstoj, beletero ks., kie ekzistas uzataj esperantigitaj nomoj, oni prefere uzu tiajn, jam tial, ke ĉiuj pluaj derivaĵoj estas oportunaj /Parizeca maniero, Roma teatro, Munkena perfido, Vienanoj, Praganoj, praga ŝinko/. Ĉi tie ne validu subjektivaj malpreferoj/ eĉ historie motiveblaj/, ki- el ĉe iuj rilate la nomon Prago. Tiu estas centprocente in- ternacia. Unue ĝi estas slava, Praga estas ruse, pole, ukra- ine, serbokroate, radiko Prag- estas en la latina, franca, angla, hispana, itala, germana ka. lingvoj. Por internacia lingvo decidus la plej internaciaj formoj. Tial iuj ne suk- cesis uziĝi "Suomio" anstataŭ Finnlando ks.

Mi ankaŭ legis en ies traduko presitan tekston: "Karel May ofte ŝipveturis sur Elbo el Drážďany al Ústí nad Labem". La tradukinto forgesis, ke en Esp. nomojn de fremdaj sonoj kaj lokoj oni skribu en ties nacia formo aŭ esperantigita, se tia ekzistas, nomojn de riveroj trafluantaj plurajn lan- dojn en ilia Esp. formo. Do la frazo devus teksti: Karl May ofte ŝipveturis sur Elbo el Dresden al Ústí nad Labem" au "Karlo May ofte ŝipveturis sur Elbo el Dreseno al Ústí nad Labem".

Fine pri "Nacia Komitato". Prave A. Slanina diras, ke povus sambone aŭ eĉ pli prave esti "Popola Komitato". Ne pro tiq, ke Nacia Komitato signifus defendantan unu nacion minorita- ton, sed ke hodiaŭ pli taŭgas "Popolo". Dum ĝia ekesto en la "Programo de Košice" estis la liberigantaj n a ĉ i o j ĉeĥa kaj slovaka la ĉefagantoj ĉe ni en la kontraŭfasisma, kon- traŭhitlera batalo. Tiam ĝi estis tre trafa epiteto. Hodiaŭ estas, mia opinio, membroj de la Komitatoj ankaŭ anoj de la naciaj minoritatoj, do laborula popolo, kaj la Komitatoj gar- dantaĵ la interesojn de la tuta popolo eĉ pli ĝuste nomigus "Popolaj Komitatoj".

Jiří Kořínek

## Krucenigmo


**Horizontale:** A. Urbo en Helenujo /r/; nomo de sovet. lago; perdi la vivon pro akcidento. - B. La unua parto de la moto. C. Prepari liton por dormi; arto paroli antaŭ publiko /r/; preĝeja muzikinstrumento. - Ĉ. Demanda pronomo pri objekto; refleksiiva pronomo de la tria persono; gardena frukto /r/; urbeto en Egiptio; esti konforma al situacio /r/; urbeto en RSFSR; skrapo kampon /r/. - D. Multekosta metalo /r/; mal- longigo de "antaŭtagmeze"; gustigaĵo por mangajaĵoj; simbolo de hidrarga sulfido; donanta profitan rezulton /r/; grasa likvaĵo /r/; moviĝi per piedoj /r/. - E. Teksaĵo kun grandaj interspacoj; ago; unuo de pezmazuro por diamantoj /r/; plur- jara herbeca planto /r/; malĉasta diboĉo /r/. - F. Frakcio; en maniero de parhufa remaĉulo; plej grava persono en iu fa-

ko; terpeco /r/; ĉeĥa florestro kaj komponisto. - G. Unuo de elektra rezistanco /r/; la dua parto de la moto; simbolo de radono. - Ĝ. Turka oficiro /r/; hemiptera insekto; muzika si- gno; mallongigo de televida kompanio en Paragvaĵo.

**Vertikale:** 1. Grava korporgano. - 2. Sona alarmiga instru- mento. - 3. Slovake "kiu"; la plej malgranda ero de materio /r/. - 4. Tagmeza ripozo; rilatanta alon. - 5. Hebrea festo; prizorgi malsanulon /r/. - 6. Iu ajn arbitra; indignoespri- manta. - 7. Mallongigo de indonezia radiokompanio; aparte- manta al la sama familio /r/. - 8. Instrumento por tiri; in- nanta al la sama familio /r/. - 9. Kantata teatraĵo kun orkestra akompa- donezia insularo. - 10. Definitive skribita; korda instr men- no; universo /r/. - 11. Atmosfero de medio /r/; saltanta insekto /r/. - 12. Speco de arbedo /r/; epiteto de iuj vejnoj /r/. - 13. Regule vizitanta la lokon de sia ofico /r/; mallongigo de Tutmonda E-ista Junulara Organizo. - 14. Rilatanta specon de poŝta sendaĵo; multfoje okazanta /r/. - 15. Urbeto en Angolo; gen- to de falkoformaj birdoj. - 16. Poezia nomo de kamparo; uzan- to de iu objekto por pago /sen fina o/. - 17. Ano de iama germana tribo; romie 2600. - 18. Nobla celo; derompita parto de io /r/. - 19. Interne; malgustaĵo /r/. - 20. Deveno /r/. 21. Fabrikmarko de ĉeĥaj horloĝoj.

**Helpo:** Ĉ: Asi, Ola. - E. Arum/o/. - Ĝ. TCC. - 5. Purim. - 7. RRI. - 8. Kai. - 12. Safen/a/. - 13. Asidu/a/. - 15. Ebo. 16. Ruro. - 17. Englo.

Adolf S t a ŝ u r a



La moto de krucenigmo el Starto n-ro/80 estas jena: AMO ES- TAS ĈIO EN VIVO DE VIRINO SED NUR EPIŝODO EN VIVO DE VIRO "Premion gajnis Štoviček kaj Pomykacz. Ĝi estis libro de Art- hur Bauer "La fenomeno Svislando".

## INFORMOJ DE SEKRETARIO

Sen influo de malbona vetero organizis E-Klubo Jablonec nad Nisou dum 26a de aprilo tradicionan "Printempan pacmarsadon". Partoprenis esperantistoj ankaŭ el malproksimaj urboj, kiel Praha, Pardubice, Budejovice, Přerov, Jaroměř ka. Krome venis gastoj el la nia najbara lando GDR. Honoran premion de ĈEA ĉijare transprenis grupo el Přerov, ĉa plejgrava estas, ke esperantistoj denove bone propegis per taŭga maniero la ideon de internacia solidareco. Oni povas jam nun anonci por nova printempa pacan marsadon kiu estos preparota por 25a aprilo 1981.



En nia ĉefurbo Praha estis fondita nova E-klubo. De 14a majo oni kunvenas en kafejo Na valdeku 1, Praha 2-Vinohrady, ĉiam post la 17a horo. Temas pri klubo, kiu okupiĝos ĉefe pri la literaturo, ĉar membroj estas nur la aktivaj poetoj, verkistoj, tradukistoj. Interese estas, ke ne nur esperantistoj, sed ankaŭ tiuj konataj, ĉefaj verkistoj, kiel honora prezidento de klubo "merita artisto de ĉeĥa socialista respubliko" František Kožík. Sekretario de la klubo estas nia membro, poeto Jiří Karen. Klubo invitas aliajn esperantistojn partopreni iliajn programojn ĉiun trian lundon en sama kafejo. Programoj nomas "Niaj poetoj prezentas sin". Fine de septembro preparas la klubo signifan arangon: amiken, vesperan kunvenon kun poeto F. Kožík en reprezenta biblioteko de STROJIMPORT, Praha 2 sub aŭspicio de tiu granda organizaĵo. Ni invitas jam nun ĉiujn, kiuj amas la poezion.



Nia asocio preparis karavanon por 65. Univerŝala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Grupo 30 nombra logos en hotelo por favoraj prezoj. Ni kalkulas veturi vagonare kaj el GDR persipe. Vojo daŭros ĉirkaŭ 30 horoj.

## Kompletigas la Honora Komitato de UK.

Aldone el jam konataj personoj aligis al la Honora Komitato de la 65a UK Lars Werner, partiestro kaj parlamentano; Jan-Erik Wiström, ministro pri eduko kaj kulturo de Svedujo; kaj Birgitta Wistrand, prezidento de virina asocio Frederika-Bremer-Förbundet.

Propra programo de UK en Stokholmo estas tre ŝtopita pere de la interesaj kaj ankaŭ por estonta evoluo de UEA gravej. Okazos novaj elektoj por Komitato kaj estraro de UEA oni kalkulas kun akcepto de novaj asocioj, ĉefe de Asocio de sovietaj esperantistoj kaj Ĉina Esperanto-ligo.

Oficialigis "Hispana Esperantista Asocio" Anton Balague per aprobo de hispana Ministerio pri Interna Politiko. Tio okazis 16 de januaro. La unua fojo en Hispanio oficiale naskigis esperantista orgajizaĵo kies celo estas: labori por ke la homo komune vivu pace, por ke li estu pli feliĉa.

Sur la foto viro en unua vico estas prezidento de asocio LUIS SERRANO PEREZ/ en blanka ĉemizo/ kun grupo de esperantistoj el nia asocio kiuj lian familion vizitis en Barcelona.



Nia asocio dankas al ĉiuj geesperantistoj el la mondo, kiuj kiuj sendis al ni gratulojn okaze de la majo kaj 35a liberiĝo far de Ruga armeo.

Redakcio de nia STARTO petas ĉiujn, kiuj volas publikigi informojn pri okazintaĵoj, ke ili skribu tiuj post la fino de tiuj arangoj en Esperanto. Fotoj devas esti teknikaj bonaj, nigra-blankaj formato de bildkato. Viajn kontribuojn por estonta numero de STARTO ni povas akcepti ĝis la 15a aŭgusto 1980 j.

## TURISTIKO

Ankaŭ nun vi povas aliĝi el diversaj E-aranĝoj en Pollando, Bulgario.

### Pollando:

- 4- EPF 19.07 - 1.08 Internacia Infana Esp. Vilaĝo en Funkaĉe  
Chojnice prezo Kčs 490,-
- 5- EPG 27.07 - 1.08 Gdańsk antaŭkongreso prezo Kčs 990,-
- 6- EPB 25.07 - 1.08 Bydgoszcz -Kongreso de Tutmonda Esperan-  
tista Vegetara Asocio prezo Kčs 990,-
- 8- EPM 31.08 -14.09 Miedzizdroje - Swinoujscie - VIIa Inte-  
rnacia E-feriado ĉe Balta maro ,  
prezo Kčs 2290,-
- 9- EPW 12.08 -26.08 Wladyslawowo apud Gdansk ĉe Balta Maro  
Somera Esperanto-Lernejo  
prezo Kčs 1590,-
- 10-EPB 08.11 -13.11 Via Internacia Foiro de Esperanto-Turis-  
mo Warszawa-Bydgoszcz-Gdansk-Toruń-War-  
szawa prezo Kčs 1190.-
- 40-EPB 13.07-20.07 Internacia E-kursoj -Varsovio -Bydgosz-  
cz-Varsovio prezo Kčs 990,-


### BULGARIO

01. - 14.09 Internacia kursejo en Varna prezo Kčs 2450,-
16. - 29.09 " " " " " " Kčs 2450,-
01. - 14.10 " " " " " " Kčs 2150,-
16. - 29.10 " " " " " " Kčs 2150,-
01. - 14.11 " " " " " " Kčs 1980,-
16. - 29.11 " " " " " " Kčs 1980,-
01. - 14.12 " " " " " " Kčs 1980,-
16. - 29.12 " " " " " " Kčs 1980,-
- 30.12 -3.1.1981 Silvestra balo Kčs 1200,-
- Esperanto-kursejoj por infanoj en BURGAS / kun matura gvi -  
dento /.

01. - 14.07 / por infanoj de 11 - 14 jaroj / .... Kčs 2.150
16. - 29.07 / por mezlernejoj / ..... Kčs 2.150

Prezo ne inkluzivas vojaĝkostojn kaj poŝmonon. Por aliĝo uzu  
mendilojn el STARTO 2/80.

STARTO - nepravdelný věstník Českého esperantského svazu ,  
Jilská 10. 110 00 Praha 1. vydávaný pro potřebu členů svazu.  
Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr Jaro -  
mír Jermář CSC a Zdenko Křimský. Grafická úprava M. Lábašta .  
/příloha Jaroslav Klement /. Tisk zajišťuje Technické ústře-  
dí knihoven Praha. Předáno do tisku 15. května 1980. Dohledací  
pošta Praha 07, snížený poštovní poplatek povolen Ředitel -  
stvím pošt Praha, pod čj. zn. P/1-1267 ze dne 6. dubna 1979.



## HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion  
kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de  
via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri  
tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj  
ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi  
meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la  
plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ  
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY  
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ  
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ  
JÁCHYMOV  
TEPLICE V ČECHÁCH  
PODĚBRADY  
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBŮŇ  
JESENÍK - LUHAČOVICE  
TEPLICE NAD BEČVOU  
o o o o o o o o o o o

## BALNEA

Reprezentanto  
de ĉeĥoslovakaj  
banlokoj  
kaj kurac-fontoj,  
Pařížská třída 11,  
110 01 PRAHA 1  
ČEĤOSLOVAKIO  
Tx: 122 215





### DVHM 1622 L - ALTLEVA DIZELVETURILO

La altleva dizelveturilo DVHM 1622 L havas la naftomotoron ZETOR 4901 kun la povumo 30 kW ĉe 1900 revoluoj minute. La veturilo havas la portokapablon 1600 kg ĉe la deaksiĝo de la pezocentro 500 mm. La rapideco de la veturo kun ŝarĝo estas 20 km/h, la rapideco de la levado kun ŝarĝo estas 0,50 m/s.

La levaparato de la veturilo estas teleskope elŝovebla. Ĝiaj interna kadro kaj levoplato estas metitaj ruleble sur specialaj pulioj. Ĉiuj labormovoj estas regataj hidraŭlike per la stangoj de la olea distribuiilo. En la hidraŭlikan vojon estas enmuntita sekuriga valvo, kiu en la kazo de kreviĝo de la flekstubo malhelpas al la falo de la ŝarĝo.

La senescepta eksportanto de la altlevaj veturiloj DESTA estas la entrepreno por la eksterlanda komerco STROJEXPORT Praha, Ĉeĥoslovakujo.